

John Ellerton,  
 Ni estis ja en mano Dia  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Ni estis ja en mano Dia,  
 dum brilis super ni la Sun'.  
 Protektu nin per mano Via  
 dumnokte, Dio, ankaŭ nun!

2. La ter' cirkulas ĝis la veno  
 de l' nova tag', ripozas ni  
 dum tiu nokt' en Via beno<sup>2</sup>  
 ĝis la mateno, kara Di'.

3. Nun kiam en malhel' fordronas  
 la Sun' en tiu ĉi vesper',  
 multvoĉe Via laŭdo sonas  
 alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta  
 la Teron lumo de l' maten',  
 senĉese estas plusonanta  
 preĝado de la homoj jen.

5. Ja estas, Dio ĉipova,  
 senlima Via regno, nin  
 konduku al la tago nova  
 en Via regno je la fin'!

...

John Ellerton,  
 Du lässt den Tag, o Gott, nun enden  
*tradukita de Raymund Weber*

Argiope-informo:  
 La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
 Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

---

<sup>2</sup>aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATTISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-01-10.

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)

Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland “Gotteslob”, in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Muziknoten findet sich auch auf der Heimseite [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Veser\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Veser_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).